

Eŭropa Bulteno

Aprilo 2019, Numero 191

SUBTENU PORPACAJN PARTIOJN DUM LA EŬROPAJ BALOTOJ



La 25-an de majo okazos balotoj por nova konsisto de ĉeforgano en Eŭropa Unio: Eŭropa Parlamento. Tiu EP administros European Union dum la postaj 5 jaroj, do ĝis majo 2024. Poste oni konsistigos ankaŭ Eŭropan Komisionon, kiu prezentas iaspecan registaron de EU kun ministroj pri unuopaj branĉoj de socio. Kiu prezidos Eŭropan Komisionon oni povos vidi post la balotoj de la EP ĉar la prezidanto estos persono el la partia koalicio kiu gajnos plej multajn voĉojn. Laŭ nunaj esploroj verŝajne tio estos germana reprezentanto Manfred Weber, kiun jam proponis la meze dekstraj partioj, la tiel nomata Popola Koalicio.

Mi opinias ke ankaŭ por esperantistoj gravas partopreni en la voĉdonoj, ĉar ĉi tiuj balotoj estas pli gravaj ol antaŭaj ĝuste pro tio ke minacas esenca fortiĝo de ekstremaj partioj kiuj fakte agos kontraŭ la Unio (cele al ties disfalo). Ja la populismaj kaj naciismaj politikistoj defendas nur naciojn kaj ne ŝatas komunajojn. Sendube la grandaj ŝtataj komunajoj kia EU, havas ankaŭ malbonajn aspektojn kiujn multaj ne ŝatas, sed kio estas la centra atingo de EU ĝis nun? Laŭ mi sendube la komuna ŝtato malebligas la militojn inter eŭropaj naciaj ŝtatoj. Kiel konate la du mondaj militoj ekestis ĝuste en Eŭropo, kie regis jarcente granda rivaleco inter la du plej grandaj fortoj: Francio kaj Germanio. Ke tio ne plu okazis de post la dua mondmilito, oni povas danki nur al ekzisto de EU.

Mi estas konvinkita ke esperantistoj – kvankam ankaŭ inter ili estas normala distribuo de partiaj preferoj, la ĉefa celo de politika evoluo estas kontribui al eŭropa kaj monda paco. Tio

almenaŭ estas la centra celo de interna ideo kaj ni iĝis esperantistoj akceptante la Zamenhofan ideologion. Do, ni nepre devus batali por pluekzisto de EU kaj ĝia kontraŭmilita orientiĝo. En la lasta kvinjara periodo ni havis gravajn fortiĝojn de subteno al E-agado: Subtenis nin publike membro de Eŭropa Komisiono dro Vytenis Andriukaitis kaj diversaj entreprenoj kiujn gvidas esperantistoj ricevis monon per pluraj fondaĵoj de EU inkluzive de Multlingva Akcelilo, kiu nerekte pagas projekton kiu eksperimentas pri Esperanto kiel lerneja antaŭobjekto antaŭ lerni aliajn fremdlingvojn. Tian evoluon ni nepre bezonas ankaŭ en estonto. Kaj tio eblas nur se EU-n regos porpacaj . neŝovinistaj politikistoj. Kaj francaj esperantistoj havas apartan ŝancon voĉdoni rekte por partio kies ĉefa celo estas antaŭenigi Espeanton en EU.

Do, iru la 25an de majo al voĉdonloko kaj subtenu porpacajn partiojn.

Zlatko Tišljar

NOVAJ KOMPREENOJ PRI ESPERANTO EN LERNEJOJ



La 9-an de aprilo 2019 okazis renkontiĝo de gelernantoj 8-9-jaraj el bazaj lernejoj de Ŝentilj (Slovenio) kaj de Retkovec en Zagreb (Kroatio) en la lernejo de Zagrebo. La renkontiĝo okazis post kiam en ambaŭ lernejoj oni fininstruis la 5-an lecionon de Multlingva Akcelilo – aparte evoluinta lernobjekto kiu estas fakte tre baza

Esperanto. La celo ne estis ke ili lernu vere Esperanton sed ion kio tre utilis al ili por esence pli rapide poste lerni aliajn fremdlingvojn kaj la propran lingvon. Temas do pri iuspeca miraklo. La kursojn gvidis po du instruistinoj de fremdlingvoj kiuj neniam antaŭe mem lernis Esperanton – laŭ la instrukcioj de didaktikaj materialoj evoluintaj dum la projekto en kiu ili mem partoprenis kaj laŭ tasko de la lernejo – ne pro propra elekto. Tio por ili estis aldona ŝarĝo ĉar ili ne pro tio estis malŝarĝitaj labori pri iliaj propraj lernobjektoj. Tamen post 5-monata instruado de Multlingva Akcelilo ĉiuj – kaj lernantoj kaj instruistinoj ekŝatis E-on kaj mem iniciatis ĉi tiun renkontiĝon post kiu ili deklaris, ke tio estas la vera bezono de lingva instruado: ekuzi la lingvon en la vivo. Do, ne nur uzi la scion kiel enkondukon en postan fremdlingvan lernadon. La renkontiĝo estis bone organizita kaj planita tiel ke la infanoj estis distribuitaj mikse inter la landoj kaj devis paroli inter si kaj poste raporti kion ili eksciis pri la kunparolantoj kaj ludante tre kreivajn lingvajn ludojn. Ili ankaŭ ludis skeĉojn kaj devis verki laŭeble longajn frazojn, traduki ilin kaj konkursi. Tiam sekvis promeno tra Zagrebo kaj fine vizito al E-centro kun granda E-biblioteko. La renkontiĝo vekis intereson de Zagrebaj medioj. Pri ĝi rekte raportis dum 3 minutoj raportisto en matena kroata ĉeftelevideo, elsendo „Bonan matenon“ kaj estis surbendigita 15-minuta elsendo por Radio Zagreb.

Temas pri realigo de projekto kiu forĵetis plurajn antaŭjuĝojn de esperantistoj mem: ke ni devas havi esperantistajn instruistojn (aŭ fakultate diplomitajn E-instruistojn kiujn kreas iu porinstruista universitato, aŭ profesiajn instruistojn de fremdlingvoj kiuj havas ankaŭ grandan scion de Esperanto (ekzamenon C-1), aŭ ke Esperanton povas lerni nur tiuj kiuj tion vere ŝatas kaj deziras – kiuj ĝin lernas pro la propra rekono de graveco de Esperanto. Sed ĉi tie lernis ĝin instruistinoj pro lerneja devigo kaj lernantoj ĉar oni petis ilin. Neniu el ili iam ajn eĉ aŭdis pri Esperanto. Kaj vidu, tre bonaj didaktikaĵoj ebligis ke ili ĉiuj ekŝatis Esperanton kaj ne nur lernis la planitan programon unujaran, sed volas daŭrigi. Kaj gelernantoj kaj la gepatroj! Post ĉi tiu renkontiĝo, ĉio estos alia. Ni havos rimedon enkoduki E-on kun la komenca celo pli sukcese lerni poste aliajn fremdlingvojn kaj la propran, sed poste daŭrigante lerni ĝin nur pro Esperanto mem. Ni ne bezonas aparte edukitajn E-instruistojn. Tion povas fari iu ajn fremdlingva instruisto.



(Erasmus +) Multlingva Akcelilo.

Zlatko Tišljar

Esperanto mem havas grandan allogan forton se oni prezentas ĝin lude, sentrude kaj per plej eble malmulta morfemaro – kompreneble, tiu plej ofta – ĉar junaj infanoj ne povas rapide kaj en mallonga tempo lerni tro multajn vortojn, se vi ne volas ke ili ekmalŝatu tiun lernadon. Tio okazas dank' al antaŭaj esploroj de morfemofteco de Esperanto kaj de bone evolinta didaktika materialo en la eŭropa projekto

EŬROPA KONFERENCO KAJ KUNSIDOJ DE ASEMBLEO DE EEU EN TRIESTO



Kiel ni jam plurfoje informis, ni ripetas ĝin ĉar la la antaŭlasta aliĝdato kun malpli altaj kotizoj estas la 31-a de majo.

La Konferenco de EEU pri la temo:

»Multlingva Politiko de EU en lernejoj«. « okazos de la 25a ĝis la 27a de aŭgusto 2019 en Triesta hotelo: Savoia Excelsior Palace. Jen la programo de la konferenco:

Dimanĉo, la 25-an de aŭgusto:
09.30 - 11.30 Salono TERGESTE -
Oficiala inaŭguro. Interveno de Vytenis Andriukaitis, komisionano de Eŭropa

Unio - Esperanto kaj lingva justeco en Eŭropo.

14.30 - 16.00 Salono EXCELSIOR - EEU-Estraro kun Vytenis Povilas Andriukaitis

17.30 - 19.30 Salono EXCELSIOR - EEU-Seminario

1) Seán Ó Riain - Irlandaj spertoj de lernado de dua lingvo en bazaj lernejoj ekde 1922: kiel plibonigi la rezultojn?

2) Zlatko Tišljar - Rezultoj de la projekto “Multlingva Akcelilo”, kiun financas Eŭropa Komisiono per sia fonduso Erasmus+.

Lundo, la 26-an de aŭgusto

09.00 - 12.00 Salono IMPERATORE - EEU-Seminario

1) Jozef Reinart - Vademecum de multdisciplina projekto: Movebleco kaj inkluziveco en multlingva Eŭropo.

2) Michele Gazolla - Lingva politiko kaj lingva justeco en nuntempa Eŭropo

La Asemblea publika kounsido de EEU dediĉas sin al novaj perspektivoj por E en EU kaj al agnoskoj de Esperanto-kulturo kiel nacia kultura heredaĵo de Pollando kaj Kroatio.

La partoprenantoj povos ĝui en la programeroj de la samtempe okazanta Itala E-kongreso, al kiu aldoniĝis ankaŭ Enesko-Forumo.

Ni invitas ĉiujn Eŭropajn esperantistoj veni kaj partopreni – aparte tiuj el proksimeco kiel esperantistoj de Italio, Aŭstrio, Svisio, Slovenio, Kroatio, Hungario, Slovegio...

Detalaj informoj en antaŭaj numeroj de Eŭropa Bulteno kaj sur la paĝaro:

<https://kongreso2019.esperanto.it>

D-ro Seán Ó Riain, prezidanto de EEU

UNESKO-FORUMO EN TRIESTO



Al la kongresa programo de itala E-kongreso aldoniĝis "Forumo pri Unesko", sekve de instigo de Trezoro, la ĉina ĉefa redaktanto de la E-eldono de Unesko Kuriero,

Okupiĝos pri tiu ĉi parto Michela Lipari, prezidantino de Itala E-Federacio.

La forumo estas sekvo de interkonsento de UEA kun UNESKO disvastigi la idealojn kaj valorojn de Unesko per Esperanto kaj ricevi permeson aperigi UNESKO-kurieron ankaŭ en Esperanto kaj la libron pri UNESKO “De ideoj ĝis agadoj: 70 jaroj de Unesko”.

Dum la forumo oni prezentos ankaŭ UNESKO-kurierojn kaj la laboron tiusenkan.

Edvige Ackerman

LA DUA EŬROPA CIVITANA RENKONTIĜO EN KASSEL, GERMANIO

La 2-a Eŭropa Civitana Renkontiĝo (ECR) en Kassel okazos de la 7-a ĝis la 10-a de majo 2020. La temkampoj estos "La Mondo de Laboro", "Hobioj kaj Libertempo", "Kleriĝo kaj Lingvoj", "Familio kaj Junularo", "Religio kaj Etiko", "Politiko kaj Juro", "Sano kaj Socialo", "Sporto, Muziko, Arto".

Okazos ankaŭ laborateliero "Esperanto kaj Eŭropo" kadre de "Kleriĝo kaj Lingvoj", pri kies organizado ĉefe mi respondecas - en la germana. Poste ankaŭ en esperanto). La Kasselaj esperantistoj sub la nomo "Esperanto-Rondo Kassel" estas organizataj en la Kulturinitiative Harleshausen e.V. - KIH (www.kih-kassel.de). Harleshausen estas la plej norda kaj la plej verda kvartalo de Kassel, estas eĉ kelkaj farmbienoj kun bioagrikulturo tie.

Mi invitas esperantistojn kiuj povas prelegi pri la supre prezentitaj temoj anonciĝi ĉe mi. kaj pri "Esperanto kaj la Lingvopolitiko de la Eŭropa Unio" (3 horojn, inklude de diskutrondo). Do, la 2-a Eŭropa Civitana Renkontiĝo (ECR) en Kassel okazos de jueves, la 7-an ĝis dimanĉo, la 10-an de majo 2020.

La temkampoj estos "La Mondo de Laboro", "Hobioj kaj Libertempo", "Kleriĝo kaj Lingvoj", "Familio kaj Junularo", "Religio kaj Etiko", "Politiko kaj Juro", "Sano kaj Socialo", "Sporto, Muziko, Arto".

Jen alroĉite la skizo de la laborateliero "Esperanto kaj Eŭropo" kadre de "Kleriĝo kaj Lingvoj", pri kies organizado ĉefe mi respondecas - en la germana (poste kompreneble ankaŭ en esperanto). La Kasselaj esperantistoj sub la nomo "Esperanto-Rondo Kassel" estas organizataj en la Kulturinitiative Harleshausen e.V. - KIH (www.kih-kassel.de). Harleshausen estas la plej norda kaj plej verda kvartalo de Kassel, estas eĉ kelkaj farmbienoj kun bioagrikulturo tie.

Mi kontaktos nun vin koncerne la demandon, ĉu el via laborkampo estas personoj, kiuj povas prelegi/prezenti pri la du temoj:

1. "La projekto Esperanto - aktualiigo" (2 horojn, inklude de diskutrondo);
2. "Esperanto kaj la Lingvopolitiko de la Eŭropa Unio" (3 horojn, inklude de diskutrondo).

D-ro Wolfgang Günther

AVERTO

Por eŭropanoj, la brulado de Notre Dame venas kiel pli larĝa averto: ne prenu la miraklojn, kiujn vi ĝuas por si mem. Zorgu pri ili pli multe, ĉar ili eble ne estos kun vi por ĉiam. Tro ofte la eŭropanoj navigas blinde tra pejzaĝo mirinda, kiu rajtas fariĝi senta parto de la ĉiutaga vivo. Se ili ne zorgos pri ili, ili baldaŭ rimarkos, ke tiuj pereos. Por rekonstrui ĉi tiun miron, savi ĝin de detruo, eŭropanoj bezonos pli ol monon kaj volon: ili bezonos profundan pripensadon pri tio, kion ili havas kaj kion signifas esti eŭropano.

Notre Dame estas averto al Eŭropo: ne prenu tion, kion vi validas, per si mem

https://www.theguardian.com/commentisfree/2019/apr/16/notre-dame-warning-europe-value-cathedral-flames?CMP=Share_iOSApp_Other

Trovis en la reto: Sandra Schweder


„Longa vojaĝo komenciĝas per la unua paŝo“ (El Ĉinio)

KIEL NI RILATU AL NEESPERANTISTOJ

Antaŭrimarko: La opinioj de la homoj, kiuj parolas Esperanton, estas simile multspecaj kiel la opinioj de la parolantoj de aliaj lingvoj. La sekva teksto prezentas la opiniojn de tiuj Esperanto-parolantoj, kiuj konsentis pri ĝi. Ĝi ne povas esti ĝenerala pozicio por ĉiuj Esperanto-parolantoj en la Eŭropa Unio; ankaŭ neniu Esperanto-organizaĵo povas fari deklarojn por ĉiu Esperanto-parolanto.

Kreskanta uzado de Esperanto en EU kaj tutmonde

Almenaŭ cent mil EU-civitanoj parolas Esperanton sufiĉe bone por povi uzi ĝin. La uzado de Esperanto kreskas, eĉ se tio estas nur malmulte konata – en internaciaj renkontiĝoj same kiel en la interreto, en la muziko, en vikipedio, kiel denaska lingvo kaj en la landoj de la Tria Mondo. La ĉina registaro dum ĉiu labortago publikigas novaĵojn en Esperanto sur esperanto.china.org.cn.



Relative rapide lernebla. Bona regado de la lingvo estas atingebla

Pro sia reguleco Esperanto estas relative rapide lernebla. Kutime post du aŭ tri semajnfinaĵoj oni povas partopreni en internaciaj renkontiĝoj kaj plulerni el la praktiko. La bona lernebleco de Esperanto kondukas ankaŭ al tio, ke multaj Esperanto-parolantoj dum la jaro atingas tre bonan regadon de la lingvo,

pli bonan ol en siaj aliaj fremdlingvoj kaj kompareblan kun tiu de sia gepatra lingvo.

Rekono kaj dokumentado de Esperanto

Por adekvata traktado de Esperanto necesas bona informado kiel bazo. Ni sugestas, ke la EU-Komisiono rekonu Esperanton kiel unu el la lingvoj parolataj en EU, menciu ĝin en siaj publikaĵoj kaj dokumentu la lernadon kaj uzadon de Esperanto en EU. La EU-Komisiono ankaŭ esploru kaj publikigu, kiom el la interpretistoj, tradukistoj kaj aliaj oficistoj de la EU-institucioj parolas Esperanton. Entute supozeble temas pri pluraj dekoj da personoj, el kiuj du konatiĝis kiel Esperanto-aŭtoroj (Jorge Camacho kaj István Ertl). En la nuna EU-parlamento (2014/19) membras almenaŭ unu deputito, kiu lernis Esperanton.

Esperanto kiel ponto al aliaj kulturoj

En internaciaj Esperanto-aranĝoj renkontiĝas civitanoj el la diversaj landoj de EU same kiel el aliaj partoj de la mondo. Per tio ili pli bone konatiĝas kaj spertas la kulturojn de la aliaj. Ofte estiĝas pli profunda intereso kaj oni lernas pliajn lingvojn de EU por ekhavi pli bonan aliron al la aliaj EU-civitanoj kaj ties kulturoj. Esperanto subtenas la kunecon de la eŭropaj

civitanoj, kiuj parolas tiun lingvon. Esperanto signifas paŝon al la alia, paŝon por pli proksima konatiĝo de homoj kaj kulturoj.

Subtenado de la instruado kaj uzado de Esperanto

Ni ĝojas, ke intertempe en la EU-programo „Dumviva Lernado“ oni permesis ĉiujn lingvojn, ankaŭ Esperanton. Estus utile esplori la rolon, kiun Esperanto ludas en la alproksimiĝo kaj la interkompreno de la kulturoj de Eŭropo per la esperantlingvaj EU-civitanoj. La Esperanto-instruado, la memstara Esperanto-lernado kaj la uzado de Esperanto estu subtenataj simile kiel ĉe la aliaj EU-lingvoj – ĉe la oficialaj, la duonoficialaj kaj la minoritataj lingvoj.

Elektebla fako en lernejoj kaj universitatoj. Esplorado

La lernado de Esperanto kaj ĝia uzado en la internacia komunumo de la Esperanto-parolantoj subtenas la interkomprenon de tiuj EU-civitanoj. Esperanton oni pli ofte proponu kiel elekteblan fakon en lernejoj kaj universitatoj en EU; la koncernan oferton en la EU-membroŝtato Hungario ĉiujare uzas pluraj mil lernantoj kaj studentoj. Havus ankaŭ sencon uzi unu aŭ du lerneajn lecionojn por instruado pri Esperanto, ĝiaj ideo, historio kaj nuna uzado, ekzemple en la lecionoj pri la gepatra lingvo, pri historio aŭ per tiulingvaj tekstoj en la kursoj pri fremdlingvoj. Per tio ĉiu lernanto povus havi bazan informon pri Esperanto; la scion pri tiu lingvo vikipedio konsideras esti parto de la ĝenerala kleriĝo: Esperanto enestas en la listo de tiuj mil artikoloj, kiuj enestu en ĉiu versio de vikipedio. Krome la EU-Komisiono subtenu kaj kunordigu la instruadon de Esperanto kiel elektebla fako kaj la koncernan esploron, konforme kun ĝia tasko subteni kunordigon de la politiko de la EU-ŝtatoj en kampoj kiel kleriĝo, junularo kaj kulturo.

Plia uzado de Esperanto en EU-institucioj nur post plia disvastigo

La listigitaj rimedoj supozeble signifas dum la venontaj jaroj adekvatan kaj sufiĉan rekonon kaj subtenon de Esperanto en la Eŭropa Unio. Plia uzado de Esperanto – ekzemple kiel (interpretata) debata lingvo en la EU-parlamento, kiel pontlingvo ĉe interpretado aŭ kiel aldona oficiala lingvo de la EU – laŭ nia opino provizore ne estu konsiderata. Unue la nombro de Esperanton parolantaj EU-civitanoj kaj la uzado de Esperanto esence kresku. Per tio ankaŭ la faka vortaro de Esperanto por specialaj EU-temoj vastiĝos.

Esperanto ne estu la sola oficiala lingvo de EU

Eblan enkondukon de Esperanto kiel solan oficialan EU-lingvon laŭ la hodiaŭa vidpunkto ni konsideras neĝusta – sendepende de la demando, ĉu tio iam estus politike atingebla. La EU-civitanoj daŭre povu en kontakto kun EU-institucioj uzi unu el la allasataj EU-lingvoj. La plureco de la lingvoj de EU estas konservenda ankaŭ en la politika kampo

Esperanto.land

ESPERANTO-LERNOJARO 18/19 EN RUSIO

La Esperanta lernojaro 2018 -2019 en Rusio eble jam atingis sian apogeon. Multaj kursoj, kiuj komenciĝis somere kaj aŭtune, finiĝis, aliaj gvidataj kursoj daŭros ĝis la fino de majo. En kelkaj urboj, malgraŭ tre intensa varba kampanjo, kursoj ne povis okazi pro manko de aliĝintoj. Ĉi-jare konsiderinde riveliĝas sukcesa tendenco favora al la dumarangaj studadoj de Esperanto. Sed ankaŭ aliaj formoj de la kursoorganizado estas aplikataj. Mi ŝatus danki por la ricevitaj raportoj pri okazigitaj kursoj gesinjorojn Anatolo Masenko (Kislovodsko),

Konstantin Obrazcov (Tomsko), Irina Gončarova (Odincovo), Fransoazo Oazo (Francio – Ĉuvaŝio), Vladimir Sapoŝnikov (Krasnojarsko). Ĉiuj rusiaj kursgvidantoj, sendepende de ilia aparteno al REU, estas petataj sendi informojn pri gviditaj diversnivelaj kaj diverstipaj kursoj, por krei komunan datumbazon pri la Esperanto-instruado en la kuranta jaro.

Vladimir Opletajev, REU-estrarano

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de aprilo 2019

Redaktoro: Zlatko Tišljär

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljär, Sean O Riain, Edvige Ackerman, Wolfgang Günther, Sandra Schweder, Esperanto.land, Vladimir Opletajev

Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

